# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

ilei
Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

ilei IKEF UMEA

**EKO 2023 / 65. Novembro 16, 2023**


**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler. Tria kontrolanto dezirata.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 262 KB. Alkroĉaĵoj: UN 472 KB. Sume: KB 774.**

## Jen la estraro de UEA, kiu kunsidas rete ĉiun duan semajnon

Por scii la konsiston kaj taskdividojn, rigardu ajnan numeron de la revuo Esperanto



## AMO 104  - tendenco prizorgi la propran ĝardenon

La Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) kiu okazis en Fortalezo, Brazilo de la 2-a ĝis la 5-a de novembro 2023 venis al fino. Ĝi gastigis la seminarion pri Aktivula Maturigo (AMO) 104 kun ĉeftemo ''Tut-amerika kunlaboro'. Kiel kunordiganto de la Amerika Komisiono, mi devis gvidi tiun seminarion pro la nepovo de Maritza Guttierez atingi Fortalezon pro viza problemo.

Mi prezentis la seminarion al la tuta ĉeestantaro dum la solena malfermo de TAKE. Du sesioj estis planitaj. Ni sukcesis prezenti la unuan parton de la seminario sed pro la morto de elstara samideano dum la kongreso, ĉiuj programeroj estis nuligitaj fare de la respondeculoj. Eĉ se ne multaj kongresanoj partoprenis en la unua sesio pro multaj samtempaj programeroj, ili estis engaĝitaj. Tamen pro tiaj eventoj, ni ne povas taksi AMO 104 sukcesa.

Konkludoj: Ne estis multe da intereso organizi UK-on en Latinameriko en la venontaj jaroj. Oni preferis enfokusigi sur plia kunlaboro inter la latinamerikaj landaj asocioj kaj eltrovi manieron kreskigi la nombron da lernantoj de Esperanto. Estis evidente ke la Esperantistoj ne trovas valora la membriĝon en UEA, sed tio povas esti pro nescio de ĝiaj servoj (**SMG komentas sube**). Mi intencas ree prezenti la temon dum la Brazila-Kanada komuna kongreseto, okazonta rete la 18-an de novembro 2023.

**Guy Matte**

**SMG**: Facilas konsenti, ke UEA devas pli forte labori, por ke ĝiaj agadoj efike utilos por la antaŭenigo de la Eo-komunumo. Unue, ĝi devas evoluigi tiujn servojn kaj agadojn; due ĝi devas vidigi tiujn atingojn. Se ĝi sukesos fari tion, ĝi havos realan eblon konvinki kvin mil homojn membriĝi en la Asocio jam en 2024.

## AMO en Afriko – decidita la vicordo

Laŭ nia scio, por la unua fojo ni havos du preskaŭ samtempajn AMO-seminariojn. AMO 106 okazos inter la 21-a kaj 24-a de decembro en Togolando, kaj AMO 107 okazos en Burundo inter la 22-a kaj 27-a de decembro.

La temo de AMO 106 estas 'Esperanto kaj mono', en la prizorgo de Gbeglo Koffi.

La temo der AMO 107 estas 'La uzo de la nova teknologio dum instruado kaj komunikado'. La seminario estos hibrida, kun surlokuloj en la Eo-centro en Rumonge, Burundo. La ĉefa organizanto estas la estrarano de UEA, Jeremie Sabiyumva.

## La facila vento

Kajto ja flugas per facila vento:
https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/kajtoj-ne-nur-gajigas-la-%C4%89ielon-r394/

Facila vento blovu en Kongo DR
https://uea.facila.org/artikoloj/movado/helpo-al-esperanto-projekto-en-kongo-r396/

## Laŭdo por la nova arĥivo de IPR

En la lastaj 10 tagoj mi trafoliumis 45 jarojn de la revuo IPR, pli ol 150 numerojn, pli ol 3000 paĝojn!  La belega, nova arkivo de ILEI faciligegis tiun taskon. Dankegon! Mi povis verki, pli bone informite, mian skribaĵon. La aldono de ĉiuj numeroj de IPR estas signifa progreso en ilei.info.  Kaj ekde nun tiu kompleteco devas tuŝi novajn

artikolojn en IPR. Ekzemple, verki novan artikolon, ni diru, pri la Cseh-Metodo ne valoras tiom, SE vi NE unue tralegis la malnovajn artikolojn jam verkitajn pri ĝi.

Tamen mi uzis multege da horoj por trovi specifan informon. Anstataŭ horoj, simpla serĉo-kapabligilo reduktus tiujn horojn je minutoj. Se vi uzis TEKSTARO.COM, vi komprenas min. Se meti la tutan IPR-arkivon estas bela atingo en si, aldoni TEKSTARO-serĉo-kapablon estos simile bela antaŭenpaŝo kiu akcelos kaj pliprofesiigos ĉiujn venontajn artikolojn ene kaj malene de Esperantujo.

Dennis Keefe

## Lingvistika diplomito ricevos postenon en Brazilo

Ni aperigis alvokon por plenumi novan postenon de eksterlanda vizitanta profesoro en mia universitato, en Brazilo (en Juiz de Fora, Minaso, 180 km for de Rio).

Oni serĉas lingviston (kun doktora diplomiĝo pri Lingvistiko, Filologio aŭ similaj prilingvaj fakoj). Aparte dezirinda estas la kandidatiĝo de spertaj profesoroj, kun plurjara kariero en aliaj universitatoj, sed ĝi ne nepras. Oni nur postulas, ke la kandidato havu sian doktoran diplomiĝon jam de 5 jaroj minimume.

La lingvo-kono de la portugala ne estas necesa, sed se la kandidato ne scipovas la portugalan, oni postulas la anglan. La ideo estas okupiĝi pri esplorado ĉe nia Post-diploma Programo (magistriĝa/doktoriĝa) pri Lingvistiko. Kompreneble, bonvenus kolego kiu emus labori pri Esperanto aŭ Interlingvistiko. Mi aparte interesiĝas pri kunlaboro tiuterene. Jen la alvoko (anglalingve):

https://www2.ufjf.br/propp//wp-content/uploads/sites/20/2023/10/SEI_UFJF-1547705-PROPP-10.9_-Edital-Sele%c3%a7%c3%a3o-Prof-Visitante-Ingl%c3%aas-1.pdf

Mi volonte respondos, se estas iu demando.

Fabio Fortes, Professor Associado Universidade Federal de Juiz de Fora
http://www.ufjf.br/estudosclassicos

## Georgina Mercedes Almanza Lanz

(Havano, 1933.04.19–2023.11.01).

Jen memornoto pri la renoma kuba teatra, radia kaj televida aktorino, inspirinto kaj fondinto (fine de la kvardekaj jaroj de la pasinta jarcento) de la trupo ‘Las Máscaras’, tre grava en la historio de la kuba teatro, kie ŝi havis plurajn ĉefrolojn.Ŝi rolis ankaŭ en la filmoj “Amada” (Humberto Solás) kaj “Odiseado de Generalo José” (Jorge Fraga). Pro sia multjara laboro por infanoj, ŝi iĝis membro de UNIMA (Internacia Uniuĝo de Pupistoj). Plurfoje premiita pro sia arta laboro, en 2007, ŝi ricevis la Kuban Nacian Premion de la Radio. Kelkaj el ŝiaj aktoradoj dum jardekoj pliriĉigas hodiaŭ la kolekton “Heredaĵo de la kuba radio”.



Georgina esperantistiĝis en 1988 kaj, junie de 1989, elstariĝis en la 2-a Kuba Kultura E-Festivalo per deklamado de ‘Latinamerika patro nia’, de Mario Bene-detti. La tutmonda esperantistaro malkovris ŝin en 1990 dum la 75-a UK en Havano, kie ŝi prezentis la monodramon ‘Eksterordinaraj deklaroj de Rosa Pen-derton’ (de José A. Rodríguez) kaj la spektaklon ‘Rompo kun mia rutino’, kolekton de poezioj kaj etaj tekstoj de kubaj kaj alilandaj poetoj kaj verkistoj, kiel Jacques Prevert, Stanislav Stratiev, Gabriel García Márquez kaj Ernesto Cardenal. Pliajn teatraĵojn ŝi prezentis dum la 78-a kaj 81-a UK-oj en Valencio kaj Prago, respektive, samkiel dum aliaj regionaj kaj naciaj kongresoj.

Kun ŝi ni ĉiuj diris 'Esperanto por ĉiam' (ŝia spektaklo en la 95-a UK, Havano 2010). Kelkaj kubaj esperantistoj, la pasintan 19-an de aprilo, vizitis (aŭ telefonis) ŝin, celante omaĝi ŝian naŭdekan naskiĝtagon.

## Irlanda, girlanda, mirlanda

Jam en 30 lingvoj ekzistas reta kurso de Esperanto, kreita surbaze de la Zagreba metodo de Zlatko Tišljar. La reta kurso estas publikigita kun libera permesilo, do ĉiuj rajtas evoluigi ĝin. Nun ĝi ekzistas en la irlanda.

De Istvan Ertl kaj Libera folo

## La 138-a Dimanĉa Kunveno de IKEF raportis el Tanzanio

Tiu ĉiusemajna retkunsido de la komerca faka asocio IKEF okazis en la 5-a de novenbro. Prezentis la preparojn por la sekva UK en Aruŝa s-ro Costa Mashauri, kiu ja loĝas mem en Aruŝa, la kongresurbo. Lia temo estis: 'Tanzanio: la lando de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto – 2024.'



Sur la foto de SMG: Bestoj el la nacia parko Serengeti, ebla ekskurscelo el Aruŝa.

## Oferto en facila lingvaĵo

Filmeto pri la skribmaŝino de Zamenhof
https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/la-skribma%C5%9Dino-de-zamenhof-r393/

Halovena filmeto el Usono (4-minuta: lingva nivelo: B1).
https://uea.facila.org/filmetoj/ni-ludu-plu-%E2%80%93-filmo-por-la-usona-bona-film-festivalo-r264/

La hispana kongreso en Sevilo
https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/81-a-hispana-kongreso-de-esperanto-en-sevilo-r395/

## Esperanto-UN aperadas

Ni alkroĉas la sveltigitan numeron 67 de tiu regula eldonaĵo de la Novjorka oficejo de UEA. Ĉefaj novaĵoj tie estas:

- Mesaĝo al Unuiĝintaj Nacioj okaze de la Tago de UN, 24 oktobro 2023.
- La Esperanto-movado funebras la forpason de Martti Ahtissari.
- Asocia revuo festas unu kongreson, rigardas al la venonta.

======= vortoj: 1090 ========

**La kolekto de EKO por 2023:** https://www.ilei.info/agado/EKO.php (ĝis 60).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj